JEAN LASSERRE

# Ĉu militista nacidefendo estas kredebla ?

Cercle espérantiste de l'Agenais
"Laŭte!" * F 47340 Laroque Timbaut
1983 * 5 FF

— SAT —
broŝurservo

JEAN LASSERRE

# Ĉu militista nacidefendo estas kredebla ?

el la franca originalo,
kun permeso de la aŭtoro
kaj de la eldonistoj*,
tradukis R. Lavál.

* Groupes de langue française du Mouvement International de la Réconciliation (Franclingvaj grupoj de la Internacia Movado por Repacigado) - Cahiers de la Réconciliation, novembro 1982.

Cercle espérantiste de l'Agenais
"Laŭte!" * F 47340 Laroque Timbaut
1983 * 5 FF

– SAT –
broŝurservo

Noto de la tradukinto.

Pastoro Jean Lasserre, aŭtoro de la originalo, estas protestanta pastro. Lia artikolo aperis en "Cahiers de la Réconciliation" (Kajeroj por repacigado), franclingva organo de la "Internacia Movado por Repacigado", n° 11 de novembro 1982.

Ĝin tradukante mi flankelasis unu alineon, kiu pritraktas speciale teologian temon aparte interesan por kristanoj. La tuta cetero ŝajnas al mi interesa por ĉiuj homoj.

# Ĉu militista nacidefendo estas kredebla * ?

La parolo de la anoj de neperforto ofte naskas ridetojn. Oni volonte nomas ilin utopiistoj kaj senrespondecaj revuloj. Laŭdire, ilia tezo, laŭ kiu estas tempo anstataŭigi la militistan nacidefendon per neperforta defendo, ne estas kredebla. Sed ĉu la militista sistemo estas tiom kredebla ? Tiun ĉi precizan demandon ni volas priatenti.

<u>Malrespekta, skandala demando</u>.

Meti la demandon pri kredebleco de la militista defendo estas, ni plene konscias, surtreti danĝeran, minitan terenon. Ja kvazaŭ ĉiuj viroj de nia tempo faras militservon, multaj el ili pli-malpli militis. Nu, la homa menso estas tia, ke estas al ni tre malfacile objektive kaj klarvide kritiki tion, en kio ni volenevole partoprenis.

Eble tial la partianoj de la militista sistemo tiom deziras, ke ĉiu faru militservon - se necese enkarcerigante la malobeantojn. Eble ili volas per tio ĝeneraligi la respondecon pri tio, kion faras la armeoj, kaj dilui tiun respondecon en la tuta popolo. Tiel, finfine, neniu estas vere respondeca pri la faroj de la armeo, kaj ĉio povas plu daŭri kiel antaŭe.

---

* fr. crédible ; "kredebla" ŝajnis al mi pli forta ol "fidinda" (N.de la tr.).

Cetere, kvankam ni protestas, ke ni ne atakas homojn, ke ni nur pridemandas sistemon, koncepton pri la homa vivo, diskutindan teorion kaj ideologion, - ni ne evitos, ke iuj el niaj legantoj spertos reagon de skandalo, kaj eble de forĵeto. Sed ni kredas, ke la minaco, kiu pro tiu sistemo pezas nun sur la homaro, estas tiel grava, ke ni devas transpasi tiun riskon pri skandalo : silenti signifus por ni fari nin komplicoj de la vera skandalo : la disĉiploj de la Krucumito, preskaŭ ĉiuj, estas pretaj partopreni en amasbuĉado de idoj de Dio.*

---

La tradicia rezonado konsistas diri : Kiel fari alimaniere ? Ĉiu komunumo perforte atakata rajtas kaj eĉ devas sin defendi ; kaj ĝi povas sin defendi nur uzante ĉiujn rimedojn je sia dispono. Nu, la milito estas efika defendrimedo, kaj alia ne ekzistas.

"Efikeco", jen estas la peza argumento uzata de tiuj, kiuj fidas la armeon. Kaj se hazarde la militista nacidefendo ne estus tiel efika ? Tiaokaze la tradicia militista pozicio ne estus pravigebla. Pro zorgo pri vero, ni estas devigataj meti antaŭ ni la demandon pri la efikeco de la militista nacidefendo.

## A. ĈU LA MILITISTA SISTEMO EBLIGAS ŜIRMI LA NACION?

La prestiĝo, kiun ĝuas la armeo, estas bazita sur triobla kredo :

1.La armeo povas defendi la landon ;
2.la armeo povas rezignigi** eventualan malamikon ;
3.ekzistas neniu alia rimedo por defendi la landon.

Tio estas kredoj, t.e. asertoj, al kiuj oni aliĝas ne bezonante pruvojn, tiel evidentaj ili ŝajnas ; aŭ pli ĝuste, eble, tiel nia civilizacio ilin encerbigis

---

* Kristana formulo, kiun oni povas jene plilarĝigi : preskaŭ ĉiuj homoj estas pretaj partopreni en amasbuĉado de homoj. (N.d.l.tr.)

** rezignigi : tio signifas, ke per minaco pri reago (per nuklea armilo) oni pretendas igi la eventualan malamikon rezigni pri sia supozata agres-intenco.

kaj trudis al ni ekde nia juneco.

Kredo facile similiĝas al superstiĉo, kiam oni evitas (aŭ rifuzas) meti la fundamentan demandon : Ĉu ja vere ? Ĉiufoje kiam estus eble pruvi la verecon de aserto pri homaj aferoj, se ni evitas aŭ rifuzas pruvi tion, kion ni asertas, estas klare, ke nia kredo estas tre proksima al superstiĉo. Jen kial ni volas nun, koncerne la tri fundamentajn ĉi-suprajn kredojn, serioze kaj malvarmsente ekzameni la demandon, kiu ŝajnas al ni necesega : ĉu vere ? ĉu pruveble ? Tiam ni vidos, ĉu tiuj tri kredoj estas ĝuste bazitaj, aŭ ne.

## 1. Ĉu la armeo povas defendi la landon ?

La historio de la cent lastaj jaroj, de kiam la armeo fariĝis industriigita entrepreno, montras, ke ĝi estas efika precipe tiam, kiam ĝi atakas en forto kaj surprize invadas sian kontraŭulon. La ofensivoj ĝeneraligitaj en Blitzkrieg* estas profitaj. Estas klare, ke armeo servas por ataki; sed ĉu ĝi servas ankaŭ por defendi ? Jen estas tio, kion endas pruvi. Nu, oni pravigas ĝian ekziston, kaj la egan buĝeton, kiun ĝi kostas, proklamante, ke ĝi povas defendi la landon. Ĉu vere ? Kion diras la historio ?

### Konstanta signifo.

Francio, por ekzemplo, estas invadita aŭ atakita kvinfoje : 1870, 1914, 1940, 1946 (Hindoĉinio), 1954 (Alĝerio). La kvin fojojn ĝia armeo ne sukcesis defendi la landon (ĉar en 1918, se la Usonanoj ne estus intervenintaj, tute ne estas evidente, ke ĝi povus elimpliki ĝi el la germana armeo, kaj la Norda Francio ne estus ŝirmita : male, la angla kaj franca artilerio kontribuis en ĝia ruinigado, verŝajne 50 procente).

Sed jen ankoraŭ pli pruve : dum la dua mondmilito la germana armeo gajnis ĉiujn siajn ofensivojn (ni parolas pri la veraj invadoj en Blitzkrieg), escepte de Stalingrad, pri kiu ni poste parolos, kaj poste ĝi perdis ĉiujn siajn defensivojn. Koncerne Stalingradon, oni scias, ke la armeo de von Paulus, atinginte la antaŭurbon, troviĝis disigita de siaj bazoj per rusa tenajla kontraŭofensivo. Ĉiuj germanaj generaloj petegis

---

* Blitzkrieg : fulma milito = rapidega ofensivo.

Hitleron ordoni al tiu armeo, ke ĝi revenu por kun-iĝi kun la plimulto el la germanaj trupoj, sed la diktatoro ne volis aŭskulti la voĉon de prudento, kaj Stalingrad fariĝis la tombo de la germana armeo. Tiu fiasko estis do esence kaŭzita de la frenezo de la Führer ; tiam ni malakceptas tiun esceptan okazon de fiaskinta ofensivo, ĉar oni ne povas kalkuli pri frenezo de la ĉefo de eventualaj invadantoj.

Oni atentigos nin, ke en 1940 la francaj divizioj venke rezistis al invadoprovo de 32 italaj divizioj sur la Alpoj. Sed estas nenio komuna inter tiu malpopulara provo kaj tio, kion oni nomas Blitzkrieg. Tiam estis nenia koleriga jurmalpaco inter Italio kaj Francio. Tiu atako estis nek politike nek psikologie nek militiste preparita. Ŝajnas, ke Musolini, preskaŭ sola, volante profiti por sia persona prestiĝo de la fakto, ke la franca fronto estis jam larĝe krevigita de la germana armeo, abrupte decidis tiun frenezaĵon ; dume la itala popolo tradicie amika de Francio, povis nur kun malbona konscienco ataki sen motivo najbaron jam falintan surgenue, kaj lastmomente impeti por helpi al venko, kiu povis nur maltrankviligi ĝin.

Ni vidas nur tri aliajn ekzemplojn de fiaskintaj ofensivoj.

En 1922 greka armeo estis fine forpelita de Turkio ; sed ĝi estis nur ekspedicia trupo, kiu, por ŝirmi la grekajn komunumojn de Malgranda Azio, kredis, ke ĝi povas profiti de la turka anarkio.

Same pri la fiasko de la Afrika Korpuso de Rommel en Libio. Ĝi estis ankaŭ ekspedicia trupo operacanta je 5000 km de sia bazo, kaj ĝia kapitulaco estis esence kaŭzita de teknika incidento : ĝi troviĝis sen akvo kaj benzino.

Fine, en 1940, itala armeo invadis la nordon de Grekio, kaj ĝi ja estis haltigita de greka armeo ne malproksime de la landlimo, en la Epirmontoj, kaj forpelita en Jugoslavion en 1941. Bedaŭrinde, kelkajn monatojn poste, germana armeo totale invadis Grekion ĝis la fina disfalo de la nazia Germanio.

Do neniu el tiuj kvar ekzemploj povas pretendi malĝustigi nian tezon. Ne mirige, ke la teoriistoj de la militista arto ĉiam konsilas transporti la militon ĉe la kontraŭulon.

Ĉu tiu konstanteco estas klarigebla ?

Oni konstatas en ĉiuj sportaj bataloj, ke atako estas profita ; ĉu temas pri bokso, rugbeo aŭ futbalo, teniso aŭ eĉ ŝako, preskaŭ ĉiam la atakantoj venkas. Cetere la psika situacio de invadanto estas pli entuziasmiga ol tiu de defendanto. Plie, la pafaĵoj de la defendantoj, celante atingi invadanton jam enŝoviĝintan en la atakita lando, riskas detrui domojn kaj homajn vivojn apartenantajn al ilia propra popolo ; tio metas ilin en psikan pozicion malfacilan, embarasan, do malpli favoran al efika agado. Male, la invadantoj ne spertas tiajn skrupulojn, ili pafas sen ia inhibicio, sekve pli efike.

Oni povas precizigi tiun ĉi temon notante, ke la invadantoj sin scias proksime sekvataj de tuta serio da sinsekvaj trupoj de ilia propra armeo, tiel ke, se ili troviĝas en malfacila situacio, ili tuj ricevos helpon (eĉ kun ĝendarmoj por aresti la eventualajn fuĝantojn kaj eble ilin pafmortigi) ; do, ĉiel, ili ne havas alian solvon ol fuĝon antaŭen. Male, la defendantoj estas facile demoralizitaj, ĉar ili ne estas certaj, ke ili havos malantaŭ si la necesajn helpofortojn, kaj ĉar ili vivas en la timo esti ĉirkaŭbaritaj kaj disigitaj de siaj arieraj pozicioj ; do la refluo al ariero estas reala tento.

Ankaŭ alia faktoro demoralizas la soldaton de atakata armeo ; li scias, ke se li estos vundita, li havos malgrandan ŝancon esti helpata ; se amikaj brankardistoj lin trovos ĝustatempe, ili kondukos lin necese tra la fajro de la bombardado kun grandegaj riskoj ; plie, eĉ se li atingos hospitalon, tiu ĉi riskas esti jam aŭ baldaŭ bombardita/ota. Male, se li ne estos forprenita de amikaj brankardistoj, li estos trovata de malamikoj, eble malbone flegata kaj militkaptita.

Male, la soldato partoprenanta en la agreso scias, ke se okaze li estos vundita, li estos baldaŭ trovata de siaj brankardistoj, kaj estos evakuata al hospitalo malproksime de la batalo : iusence li estos provizore savita.

Eble endas ankaŭ priatenti, ke en la vetkurado por la efektivigo de novaj ofensivaj kaj defensivaj armiloj, ĉiam la unuaj ricevas pli rapidajn kaj spektakl-

ajn progresojn, tiel ke la dua amasigas pli kaj pli grandan malfruon : tial la defensivaj estas malpli kaj malpli efikaj.

Tio estas tiel vera, ke en 1940 la germanoj invadis Belgion kaj Nederlandon samtempe kiel Francion, ĉar ili estis certaj, ke ili venkos ĉi tiun. Ili povis sin limigi al atako kontraŭ Francion solan, same kiel ĝis tiam ili ĉiam invadis nur unu solan landon : Nederlando ne estus reaginta, Belgio estus nur sendinta ekspedician trupon en Francion ; sed ne : la germanaj militistaj ĉefoj estis tiel certaj venki, se nur ili atakos en forto, ke ili invadis tri landojn samtempe. Ĉu ne signifoplene ?

Fine endas konstati, ke la modernaj rimedoj estas tiel potencaj kaj perfektigitaj, ke kiam eventuala invadonto sukcesis taŭge prepari la koncentradon de siaj motorizitaj trupoj, same kiel la masivan kaj bone sinkronigitan intervenon de sia aerforto (kaj eble de siaj taktikaj atomarmiloj), ili konsistigas en la horo H de li elektita specon de rulpremilo detrueganta, kiu ĉion forbalaas kaj premegas sur sia pasejo, kaj ĝi tutcerte pasas. Male, la kontraŭulo necese dismetis siajn fortojn laŭlonge de la minacata landlimo, kaj ili ne disponos tempon por organizi ĝi laŭ la subita atako. Nepre ili estos superataj. Almenaŭ tion instruas al ni la spertado de la lastaj jardekoj. Kaj estus danĝere ne lasi sin instrui de la spertado.

<u>Malfacile evitebla senelirejo</u>.

Oni obĵetos, ke ankaŭ ni, kiel iuj staboj, malfruas je unu milito, kaj ke kun la atomaj armiloj la problemo de nun staras en tute malsamaj terminoj ; tiel oni celos refuti la konstanton, kiun ni kredas distingi en la moderna historio. Sed ni ne vidas, kiel la eventuala uzado de nukleaj armiloj povus efiki favore al la atakanto : ja tiu ĉi povos, ekde la unuaj minutoj, ricevi decidigan kaj neinversigeblan avantaĝon, same kiel en la nokto de la 9a al la 10a de majo 1940, la germana aerfloto, detruante sur la tereno 60% el la franca, tuj certigis al si la venkon. La eventuala reago de atomarmilaj submarŝipoj, se ĝi

povos okazi, nemulton ŝanĝos en la lamentinda sorto de la atakita popolo, kaj oni ne vidas, kiel ĝi povus inversigi la sekvon de la okazoj. Ĝi pli probable riskus provoki totalan vitrigadon de la atakita lando. Generalo Buis avertis nin : "Lando dotita per certa nombro da atomcentraloj estus nedefendebla."

Nu, la evoluado de la internaciaj moroj estas, ho ve! klara sur tiu punkto : de nun oni atakas surprize, sen militproklamo, kaŝante siajn intencojn kaj siajn preparojn, por kiom eble trafi sian kontraŭulon sendefenda. Tion oni vidis la 10an de majo 1940 en Francio, ankaŭ en Pearl Harbor, kaj je la aliancaj albordiĝoj en Normandion kaj aliloke, kaj en Hiroŝimo. Tiuj moroj metas en situacion de granda malsupereco, tuj dekomence, la armeojn restantajn en defensivo.

Iuj senpripense diros, ke en tiaj cirkonstancoj, se iu invadminaco precizigus, necesus, ke ni mem iniciatu, kaj impetu en preventan atakon. Sed tia politiko necesigus, ke oni antaŭe elektris sian propran popolon per malama kaj agresema propagando de faŝista tipo, kio supozigas starigon de diktatora reĝimo bazita sur brutala kaj nihilista koncepto de la vivo, laŭ la nazia maniero. Sed tiam, ĉu la rimedo ne estus pli malbona ol la malbono ?

Ni spertis tian sen elirejon en la epoko de naskiĝo de la naziismo. Oni ĉiam diras al ni : necesis milite interveni en la epoko de la ascendado de Hitler ! Sed kiel militiste ataki kaj venki popolon kolerigitan kaj sovaĝe decidintan por ricevi juston, uzante la armeon de popolo restinta proksimume civilizita, popolo, kiu havas nenian urĝan motivon por malami siajn najbarojn? unuvorte, kiu estas nemulte motivigita ? Por kio utilus celi venki armeon pretan por ĉion amasbuĉi, se por tio, laŭ la militista metodo, kiun oni volas sekvi, necesas unue fari el nia propra armeo similan hordon ? Ĉu ne estis preferinde, en tiu epoko, serioze atenti la plendojn, ofte justajn de la germanoj ?

<u>Kion signifas, hodiaŭ, defendi sian landon ?</u>

Certe, por nacio estas katastrofo esti atakata kaj invadata de fremda armeo. Sed de nun, por tiu nacio, estas dua katastrofo esti "defendata" per militistaj

rimedoj. La fablo pri la pavimero de la urso helpas nin por tion kompreni*. La plimulto el la frapoj, kiujn nia armeo direktus al la invadantoj, trafus ankaŭ nian landon kaj nian popolon. Ni elvokis la francan artilerion, de 1914 ĝis 1918, obstinege ruiniganta la nordon de Francio por provi forpeli la germanojn. La unua el miaj paroĥanoj viktimoj de la milito en majo 1940 estis virino mortigita en sia kuirejo de franca bombo ĵetita de franca hidroplano, kiu celis kolonon da germanaj kirasaŭtoj, trairantan la vilaĝon Berlamont apud Maubeuge. La malnova urbo Maubeuge mem estis totale incendiita, reduktita al cindroj, tial ke juna franca leŭtenanto kuraĝe ĝin reprenis de la germanoj apenaŭ alvenintaj. Ĉu necesas elvoki ankaŭ la usonajn bombardadojn sur Francion en 1943-44 ?

Estas mirige, ke neniam oni faras kalkulon de ĉiuj homoj mortigitaj kaj de ĉiuj bienoj detruitaj, dum oni provis "defendi" ilin per armiloj. Sed ja la pluvivantoj ĝenerale estas kontentaj.

Entute, se ĉiel necesas rezisti al invadanto, ĉu ne estus preferinde tion fari kun vivantaj homoj meze de starantaj domoj, ol kun kadavroj dissemitaj inter ruinoj ? Ĉar finfine, rezisti al invadanto, ĉu tio signifas kunlabori kun li por kune ruinigi nian landon kaj buĉi siajn samlandanojn ? Ĉu ne estus ĉi tie unu el la ĉefaj klarigoj pri la rapida demoralizado kaj la disfalo de la franca armeo en majo 1940 ?

Pli ol misaĵoj.

Endas esti klarvida kaj realista. La moderna militista teorio konsideras, ke en okazo de milito la celo estas detrui per ĉiuj rimedoj la militistan, politikan kaj ekonomian potencon de la kontraŭulo. Per ĉiuj rimedoj, t.e. : eĉ se necesas oferi multe da homaj vivoj kaj da bienoj de samlandanoj. Same kiel en aliaj afe-

-------

* Lafonteno rakontas, ke malsovaĝigita urso, vidante sian mastron perturbata de muŝo dum sia dormo, ekprenis pavimeron por mortigi la muŝon, kaj samtempe mortigis sian mastron. (N.d.l.tr.)

roj, la rimedoj emas anstataŭi la celon : la defendo, la ŝirmado, la sentoj velkas kontraŭ la neceso faligi la kontraŭulon. La orgojlo en fina venko fariĝas la vera celo : pensu pri la ribelo de la oficiroj de OAS* en Alĝerio. Oni ne plu defendas, oni detruas. Kaj oni ne hezitas detrui tion, kion oni oficiale protektas.

Pensu ankaŭ pri la stato en 1945 de tiu vilaĝo en la altaj valoj de francaj Alpoj, kie la rezistantoj provis per armiloj kontraŭstari la okupantojn. Oni scias ĝenerale, ke en okazo de invado la plej eta militista rezisto altiras kaj provokas la premegon sub diluvo da obusoj kaj bomboj de la loko kaj de ĝiaj loĝantoj. Memoru pri Roterdamo en 1940. Tio cetere klarigas kial, dum la lastaj militoj, estis mortigitaj multe pli da civiluloj ol da militistoj. Tamen ĉi tiuj pretendis defendi la aliajn.

Cetere, ĉu la civiluloj tiom deziras esti defendataj per armiloj ? De post la apero de la militistaj aviadiloj, estiĝis nova kaj premega fenomeno : la freneza forfuĝo de la civiluloj, kiuj je ĉia prezo foriĝas de la batalkampo. Memoru en majo-junio 1940 la grandegajn kolonojn da kompatindaj rifuĝantoj fuĝantaj sur la vojoj de Francio. Kaj nun ĉie en Afriko kaj en Azio, dekmiloj da civiluloj, iafoje milionoj, preferis forlasi sian landon en milito, kun ĉiuj riskoj kaj malavantaĝoj tiurilataj, ol riski esti "defendataj" per armiloj.

La potenca movado "neŭtralista" kaj "pacista", kiu (oktobro 81) agitas okcidentan Eŭropon, klare montras, ke la popolo, male ol senti sin ŝirmata per la usonaj atom-armiloj, sin sentas ja grave minacata pro ilia ĉeesto. Kaj estas tre signife rimarki, ke tiuj manifestacioj estis multe pli gravaj en tiuj eŭropaj landoj, en kiuj estas instalotaj la "Cruise" kaj la "Pershing", ol en Francio, kiu ĝis nun ne estas minacita pri tiu venena ĉeesto.

---

* OAS : sekreta armita organizo, kiu daŭrigis la militon dum la franca registaro decidis konsenti sendependecon de Alĝerio, kaj kontraŭbatalis la francajn armeanojn fidelajn al la registaro. (N.d.l.tr.).

Estas do, de nun, tre neta diseco inter la teorio (la armeo defendas la landon kaj la popolon) kaj la realo .

Milionoj da homoj mortas pro malsato en la Tria Mondo, dum oni elspezadas miliardojn, kiuj povus ilin savi ; kaj tio, por pliperfektigi kaj ankoraŭ pli produkti armilojn. Nu, tiuj ĉi estas jam dekoble tro multaj por ekstermi la tutan homan specion. Ĉu ne endas rekoni, ke la militista sistemo fariĝis perfekte aberacia kaj monstra ?

La facilanimo.

Adoptante la atom-armilon, registaro ege pliigas la riskon por sia popolo esti superŝutota per tiaj armiloj. Nu, se la armeo ja zorgas laŭeble ŝirmi siajn stabojn, siajn trupojn kaj eĉ siajn instalaĵojn kontraŭ la efiko de tiaj armiloj, ĝi ofte donas la impreson, ke ĝi totale malinteresiĝas pri la ŝirmado de la civiluloj. Ĝi eĉ lokas siajn instalaĵojn en lokoj de forta homa denso (en Francio Brest, Taverny, Mont Verdun), sed oni ne konstruas ŝirmejojn por civiluloj. Kaj tamen neŭtralaj landoj sen atom-armiloj, kiel Svisio kaj Svedio, konstruas tiajn ŝirmejojn. Sed en Francio praktike estas neniu : laŭfame tio demoralizus la homojn ; oni nur postulas de ili blindan konfidon, totalan rezignacion, fatalistan pasivecon, kiu povas esti ekzakte la malo de rezistospirito. Kaj precipe necesas, ke la popolo "kredu" pri la "rezignigo" : pri ĝi ŝirmejoj semus dubon.

Ni povas konkludi pri tiu unua punkto, dirante : tute ne estas evidente, ke nun armeo povas defendi kaj ŝirmi la nacion.

2 Ĉu la armeo rezignigas eventualan agresonton ?

Ni ne volas nei, ke armilo kaj a fortiori armeo havas "rezignigan" funkcion. Sed ĉi tie temas nur pri la tezo. Kial oni silentas pri la antitezo, laŭ kiu "rezignigo" ĉiam estigas kontraŭ-rezignigon ? Ĉio rilata al la vivo estas dialektika, ĉar ĉiam estas interagado inter la fortoj, kiuj sin manifestas kaj reagas unuj kontraŭ aliajn. Tiel la "rezignigo" alcelas sin mem neniigi per facile komprenebla bumerang-efiko,

aŭ, se oni preferas, en kirlado de magiaj cirkloj. Tio estas, kiel ripetadas Dom Helder Camara, la spiralo de perforto. Ĉi tie ni tuŝas esencan punkton.

Kion diras la historio ?

Ni komence pridemandu la historion de la lasta jarcento, kaj denove metu la decidan demandon : ĉu fakte estas vere, ke la armeo rezignigas ?

Tuj okulfrapa fakto : laŭ la principo de "rezignigo", oni atendus konstaton, ke ĝenerale eksplodas milito, kiam nacio nete pli potenca atakas nacion militiste malpli fortan. Nu, oni konstatas, ke plejofte milito eksplodas, male, pro rivaleco inter nacioj de egala potenco. Kaj ni estas devigataj dedukti, ke celante rezigngigi unu la alian, ili tute ne sin reciproke rezignigas.

Oni povas multigi la ekzemplojn : Japanio atakis la caran Rusion, Ĉinion, Usonon : tiuj tute ne estis malgrandaj landoj. Moderna Ĉinio ne timis doni severajn "lecionojn" al Japanio (ĝin forpelante), al Rusio (ĉirkaŭ Amuro), al Usono (en Koreio), al Hindio (pri Tibetio) kaj al Vjetnamio (la plej forta armeo en Azio post la Sovetia). Tiel nek Japanio nek Ĉinio estis "rezigngigitaj" de nacioj, kiuj tamen ofte ŝajnis pli fortaj ol ili. Sed ĉie oni povas fari saman konstaton : estis milito inter Germanio kaj Francio, inter Italio kaj Jugoslavio, inter Grekio kaj Turkio, inter Izraelio kaj arabaj landoj, inter Irano kaj Irako, ktp. En ĉiuj tiuj ekzemploj estas malfacile aserti, ke unu el la du intermilitantoj superis la alian dekomence, kaj do devis ĝin "rezignigi". Sed la plej drasta ekzemplo estas tiu de Usono, kiu dufoje atakis Germanion ne por profiti de ties malforteco, sed tial, ke ĝi fariĝis tro potenca.

Ni cetere opinias, ke endas elimini el nia enketo, ĉar ili ne lumigas nian problemon, la klasikajn civilmilitojn, la revoluciajn militojn (inter armeo kaj ribelantaj samlandanoj), la koloniajn militojn (en kiuj la efiko de rezignigo estas falsita per la troa diferenco de civilizacio kaj armado) aŭ ankaŭ la okazon de malgranda lando situanta inter du grandaj potencoj intermilitantaj, kaj invadata de unu el ili (Belgio, Nederlando, Norvegio, ks) : ĉar tute ne estas evidente, ke la invado estus okazinta, eĉ se tiam ne estus estinta milito inter la du grandaj potencoj. Ni ankaŭ ne devas

kalkuli pri la invadoj okazintaj pro alvoko de landoj ruinigitaj de civilmilito, ankaŭ ne la militojn por rekonkero, kiam iu granda regno, ne sukcesinte akiri juston per leĝaj rimedoj por rekonkeri provincon al ĝi etne kaj historie apartenantan, invadas tiun provincon (Ŝlesvig-Holŝtejn, 1868).

Fine, oni trovus vere tre malmulte da historiaj okazoj, kiuj povus klare konformi la klasikan skemon pri la neceso de "rezignigo". Tre granda nombro da malgrandaj nacioj vivas sendepende malgraŭ la fakto, ke ili ne povas vere "rezignigi" siajn grandajn najbarojn. Do la teorio pri necesa "rezignigo" estas iom tro simpleca : ĝi estas nemulte pravigita en la faktoj.

La kazo de la naziismo.

Oni obĵetos al ni, ke la terura sperto pri naziismo, per si sola, pravigas la neceson armiĝi por eviti esti denove konkeritaj kaj sklavigitaj de iu alia diktatoro. Endas ja rekoni, ke tiu hitlera aventuro estis terura leciono. Sed kia leciono ? La fakto, ke poste Francoj en Alĝerio kaj Usonanoj en Vjetnamio ne multe pli bone kondutis rilate malhumanajn kruelaĵojn, tiu fakto devas igi nin singardemaj en nia juĝado. La fakto naziismo ne devas mallumigi la fakton milito.

Apenaŭ elirinte el la nazia dramo, Francoj, kiuj rezistis per armiloj, siavice kulpis terurajn masakrojn (Setif 1945, Hajfong 1946, Madagaskaro 1947, ktp) kvazaŭ, ĉar ili rezistis al la hitlera perforto per kontraŭperforto, ili estis gajnitaj (aŭ koruptitaj) per la moroj de siaj hieraŭaj malamikoj. Kvazaŭ kontraŭstari perforton per perforto estus ne redukti la perforton, sed ĝin ĝeneraligi kaj pravigi. Cetere, se oni parolas pri la hitlera dramo, endas senkaŝe priparoli ĝin.

Certe, Hitler estis monstro. Sed kiu lin fabrikis? Se la Francoj, en la jaroj 20, anstataŭ aŭskulti Clemenceau kaj Poincaré, estus sekvintaj Aristidon Briand, eble ni estus ricevintaj nek Hitleron nek militon. Ja, dum la Germanoj, apenaŭ venkitaj per la usona interveno, ŝanĝis sian registaron, tiel ke de ilia flanko alia politiko estis ebla, la malfeliĉo volis, ke en Francio la samaj homoj, kiuj kuraĝe kondu-

kis la lukton kontraŭ la invadanton, restis regantaj post la armistico, kaj ili nepre volis trudi la venkitojn pagi la grandegajn ruinojn de la milito. La Versajla kontrakto, dispecigante Germanion kaj trudante al ĝi malprudente grandegan ŝarĝon de riparpagoj, ne povis esti akceptata de la germana popolo, konscia, ke estis maljuste pagigi tiel multekoste, al ĝi sola, katastrofon, pri kiu ĝi ne sentis sin sola respondeca. Kolero kaj indigno pli kaj pli fermentis en la sino de tiu popolo senkonsidere premegata.(Post la dua mondmilito la Usonanoj sin gardis pri sama eraro, kaj ĝis nun tio al ili prosperis).

Estas ĉiam danĝere lasi koviĝadi ribelemon, kiu ne povas esprimiĝi, kaj neeviteble evoluas al eksplodo de malamo kaj perforto. Laŭ nia opinio, Briand klare vidis, kaj li deziris aranĝi humanan sorton por la germana popolo. Sed li ne estis sekvita. La franca militarista ŝovinismo volis ĝisekstreme pagigi la "Boĉojn"*. La decidiga eraro estis la okupado de la Rur-regiono far la franca-belga armeo.(La Britoj kaj Usonanoj ja vidis, ke tio estas stultaĵo). Oni ne povis doni al la Germanoj pli elokventan pruvon, ke en politiko valoras nur la militista perforto. Kaj tiu prediko estis aŭdita kaj komprenita : la renaskiĝo de la germana militista potenco estis fortega, vera elfunda ondego. Hitler troviĝis antaŭenpuŝita de tiu ondego, tial ke li estis la plej rabia el ĉiuj ekstremistoj, kaj nature li ekprenis ĝian gvidadon. Oni scias pri la sekvo. Sed ni dubas, ke oni povus kontesti ĵenan konkludon : la franca militarista naciismo forte kontribuis por naskigi la nazian militarismon, ĉar la dua estis, por la granda plimulto el la germanoj, eĉ kristanaj, la sola rimedo por rezisti al la unua kaj sin elimpliki el ties premego, laŭ ilia sento neakceptebla kaj mortiga.

Endas kompletigi tiun analizon per jena konsidero : en la jaroj 20 kaj 30, gravaj financaj kaj industriaj medioj en okcidento (ne nur en Francio), teruritaj per la minaco de la rusa komunismo, kalkulis, ke potenca kaj remilitistigita Germanio estas taŭga bastiono por ŝirmi ilin kontraŭ la sovetia "minaco" ; kaj ili per ĉiaj rimedoj subtenis la nazian movadon, en kiu ili

-------

* "Boches" = germanaĉoj (N.d.l.tr.)

vidis bonegan remparon kontraŭ Moskvo. Tial ili mem kontribuis en la rearmado de Germanio.

Se tiu duobla analizo estas ĝusta, oni komprenos, ke laŭ ni la hitlera aventuro tute ne pravigas la militarismon, sed pli ĝuste ĝin kondamnas. Hitler estis la malbeninda frukto de la ŝafa universala konvinko, ke la homaj problemoj devas esti perforte solvataj. Hitler estis generita de la filozofio subkuŝanta en la militist-industriaj medioj de Okcidento. Eble tiun filozofion ni devas fine konsideri.

<u>La vetkurado al armado</u>.

Alia observo metas en dubon la teorion, laŭ kiu potenca armeo "rezignigas" la aliajn naciojn ĝin ataki : fakte, legante la historion oni konstatas, ke ju pli potenca estas la armeo de iu nacio, des pli tiu nacio riskas esti implikata en militoj. Tio estas tiom pli facile komprenebla, ke la tento utiligi tiun potencan armeon por pli-malpli dubindaj celoj pligrandiĝas kun tiu potenco. Por ekzemplo, en la jarcento de 1859 ĝis 1959, Francio posedis unu el la tri aŭ kvar armeoj plej potencaj en la mondo. Nu, oni konstatas, ke en tiu periodo ĝi estis 14 fojojn militanta (Italio, Alĝerio, Krimeo, Meksikio, 1870, Tonkino, Madagaskaro, 1914, Rusio, Maroko, Libano, 1939, Hindoĉinio, Alĝerio) plus kelkaj malpli gravaj koloniaj ekspedicioj. Jen estas io nemulte trankviliga.

En la du jarcentoj antaŭ 1917, Usono siaflanke spertis nur du relative malgravajn militojn, kontraŭ Hispanio koncerne Portorikon kaj kontraŭ Meksikio pro landlima kontesto. Sed de post 1917 Usono posedas unu el la plejbonaj armeoj en la mondo (kun tiu de Sovetio). Nu, tiuj du armeoj intervenis plurfoje en diversaj formoj sur operacejoj disaj tra la mondo ; ili estas multloke implikataj pere de "teknikistoj" kaj de "konsilantoj". Ĝuste tial, ke ili estas terure potencaj, la tuta mondo estas en angoro pri interbatalo inter ili : pensu pri la Kuba krizo, kaj pri la nuna krizo pro la Eŭro-misiloj.

Cetere, ĉu la kreo de ruĝa telefono inter Moskvo kaj Vaŝingtono ne montras, ke ili ne vere "rezignigus" unu la alian ? Se la nekontestata giganto, kiu posedas

la unuan armeon en la mondo, timas esti atakota de la dua, tio pruvas, ke la "rezignigo" ne ekzistas. Ĉu ĝi ne estus mito ?

Finfine, la ruĝa telefono povas esti utila nur, se la du interkontraŭaj ŝtatestroj estas homoj tre inteligentaj, bonvolaj kaj malvarmsangaj, kapablaj rezisti al la fortegaj premoj, kiuj riskas pezi sur ili. Kaj plie necesus, ke ili ambaŭ nepre volu, kia ajn estus la elvolviĝanta dramo, eviti la interbatalon, eĉ se ili devus "perdi la vizaĝon".

La malbeno de la vetkuro al armado vidiĝas ankaŭ sub alia aspekto : la uzo de milito necese finiĝas per la venko de la plej forta, kiu ne estas necese la plej justa. Ĉar ĝi venkis ne tial, ke ĝia afero estis la plej justa, sed tial ke ĝi estis la plej forta, la venkito neeviteble konservas la profundan konvinkon, ke ĝi mem estis prava. Tial la plimultaj el la militistaj venkoj estas pli-malpli gravedaj pri novaj konfliktoj kaj sangaj venĝoj (1871-1914, 1918-1939, ktp). Ekzistas venkoj, kiuj konsistigas venenajn donacojn, iafoje mortigajn por la venkintoj mem (Versajla Traktato).

La militistaj aliancoj.

Tamen de nun la "rezignigo" estas la preferata tezo de tiuj, kiuj kredas je la militista sistemo. Ĉar temas pri psikologia ne precize kontrolebla elemento, sur tiu tereno rifuĝas tiuj, kiuj volas je ĉia prezo konservi sian "kredon" al tiu sistemo. Ŝajne iuj kristanoj kredas pri la "rezignigo" pli ol pri Jesu-Kristo.

Por tiuj, kiuj estas nek Usonanoj nek Sovetianoj, nepre necesas kalkuli pri militistaj aliancoj por kompensi sian propran militistan malsuperecon. Sed ĉu ne estas malfacile, ekzemple al Francoj, kalkuli pri tiaj aliancoj, kiam ilia propra nacio, malgraŭ siaj promesoj, ne iris helpe al Ĉeĥoslovakio en 1938 ? kiam ĝi pli-malpli paŭtis al OTAN (NATO), tiel ke ĝia partopreno en la alianco estas ambigua ? La valoro de militistaj aliancoj estas tre limigita, ĉar la sistemo de nacioj-ŝtatoj konsekris la principon de sankta egoismo. Ĝi estas alia fendo en la sistemo. Sed tiu necerteco igas la "rezignigon" ankoraŭ pli fragila.

Demobilizitaj popoloj.

Ju pli la armeo moderniĝas, des pli la popolo mem sin demobilizas. Ja, tiu ĉi sin sentas nemulte koncernata per tiu defendo, kiu prepariĝas en sekreto kaj organiziĝas tute ekster ĝi (aŭ eble eĉ kontraŭ ĝin ?). Malgraŭ la senbremsa propagando ĉie farata favore al la armeo, la homamaso ne vidas, en kio tio ĝin trafas kaj koncernas ; ĝi absolute ne vidas, kiel ĝi estos ŝirmata, kaj se iu demandas pri tiu temo la ĝendarmojn, la respondo estas : "Vi estos avertitaj pri tio, kion vi devos fari!". Evidente la popolo ricevas pli ĝuste la senton esti ostaĝoj en la manoj de kelkaj potencaj kaj nerenkonteblaj personoj, koncerne dubindajn aferojn.

Ja plie : tiuj, kiuj iomete pensas, sin demandas pri la senco kaj la kaŭzoj de tiu vetkuro al armado kaj pri la profunda motivo de la englutado de tiom da miliardoj en la ekipado de la armeoj ; kaj ili sin demandas, ĉu tiu tuta propagando por la armeoj ne maskas, finfine, sinistran veron : nome, ke la "lobioj"* de la militist-industriistaj kompleksoj, por havigi al si monstrajn profitojn, puŝas al amasigado kaj konsumado de diablaj armiloj, kiuj konsistigas unu el la plej aĉaj plagoj en la mondo, kaj kondukas la homaron al ruiniĝo.

Ĉiaokaze, estas klare : malgraŭ la malprosperaj spertoj de 1870, 1914, 1940, nenio estas farata en Francio por prepari la popolon al rezistado en okazo de invado ; ĝi estas tute senhelpa, jam antaŭe forlasita al la volo de eventualaj invadontoj, neniel instigite nek preparite nek trejnite por rezistado. Ankoraŭfoje estos "la ĉagreno kaj la kompatindo".

Por ree pritrakti la propre diratan "rezignigon", ni ne tre bone vidas, kiel nia "frapforto" povus "rezignigi" iun potencan teroristan organizon aŭ iun riĉan kaj entrepreneman afrikan ŝtatestron, kiu, profitante de diplomatia krizo inter Francio kaj pluraj regnoj, volus sin venĝi al ĝi, faligante sur ĝian grundon pere de kamuflitaj aeroplanoj, aŭ sur ĝian marbordon pere de banaligitaj ŝipoj, kelkajn atombombojn.

-------

* lobby = ekonomiaj premgrupoj.

Por konkludi pri ĉi tiu dua punkto, sen insisti pri la risko de eraroj aŭ akcidentoj nevole kreantaj konfliktojn, ni diros, ke la fenomeno de "rezignigo" ŝajnas al ni tre fragila kaj nekaptebla. Eĉ se ĝi prokrastus la katastrofan interbatalon inter la grandaj regnoj, ĝi ne malhelpas la multigadon de la konfliktoj, kiujn ni konstatas en multaj lokoj sur nia planedo. Estus elmontri obtuzan cinikecon, ĝoji pro tio, ke la incendio ankoraŭ ne atingis nin.

## 3. "Ne ekzistas alia defendrimedo".

Ni ne longe pritraktos tiun ĉi trian kredon, ĉar ĝi ne estas la temo de nia artikolo. Ni sendas niajn legantojn al la sufiĉe abunda literaturo dediĉita al la projekto pri neperforta nacidefendo. Al tiuj, kiuj ankoraŭ nenion legis pri tiu temo, ni signalas la bonegan broŝuron eldonitan de CLICAN* kaj la altvaloran libron de Jean-Marie Muller**. Al tiuj, kiuj kun granda malfido nin demandas pri la ebleco anstataŭigi la armeon per neperforta defendorganizo, kutime ni diras : se nur vi aplikus al analizo de la militista sistemo dekonon de la kritika spirito, kiun vi aplikas al la neperforta metodo, vi mem fariĝus neperfortanoj.

Eble ĉi tiu pristudo helpos ilin por fari tiun memkritikon.

Ni volas nur atentigi niajn legantojn : en tiu eminente pravigita demando pri efikeco, kiam oni volas kompari la neperfortan metodon kun la militista metodo por solvi la homajn konfliktojn, nepre necesas sane rezoni. Oni ne povas prave kompari la luktometodojn, se oni ne komparas ilin kun historio en mano, kiam ili estas elvolvitaj en egalaj cirkonstancoj. Oni ne povas kompari la efikecon de modernaj armiloj, ĝuantaj jarmilan prestiĝon, preskaŭ totalan popolan konsenton, absolutan subtenon de la civilaj kaj eĉ religiaj aŭtoritatoj, disponantaj kvazaŭ senliman

------

* Armée ou défense civile non-violente ? (Ĉu armeo aŭ neperforta civila defendo?) CLICAN (Loka centro de informado kaj kunordigado por neperforta agado), Tulono.

** J.M.Muller. Stratégie de l'action non-violente (Strategio de neperforta agado) eld. Le Seuil, Parizo.

buĝeton en rilato kun la ebloj de la lando - kun la ĉefaj neperfortaj agadoj de nia jarcento, kiuj ĝuis neniun el tiuj faciligoj. Gandhi, Martin Luther King, Cezar Chavez aŭ la kampuloj de Larzako, ĉiuj tiuj neperfortaj batalantoj luktis, havante kontraŭ si la publikan opinion, la civilajn kaj ofte la religiajn aŭtoritatojn, la policon, la armeon kaj la tribunalojn, kaj ili daŭrigis sian longan kaj malfacilan luktadon sen alia buĝeto ol siaj propraj monoferoj kaj kelkaj privataj donacoj. Ne, vere, ne estus sane rezoni, kompari du tipojn de batalado, kiuj okazas en tiel radikale malsamaj cirkonstancoj.

Sed, se oni volas rezoni en honesta maniero, necesas kompari tiujn neperfortajn luktadojn kun, ekzemple tiuj de la franca rezistado antaŭ ol ĝi estis provizita per armiloj kaj mono de Londono, aŭ kun tiu de la IRA provizora, de la vaska ETA, de Camillo Torres aŭ de Che Gevara, aŭ eĉ kun la batalado de la Palestinanoj, kvankam ĉi tiuj estis forte helpataj. Kaj la neperforto, el la vidpunkto de efikeco, havas nenion por timi en tiu komparado.

Kiel efikus, fine, la neperforta rezistado en okazo de invado ? Post tio, kion ni povis diri, ŝajnas malfacile imagi, ke ĝi efikus ankoraŭ pli malbone ol la militista defendo. Koncerne ĝian efikecon kiel "rezignigo", necesus vidi laŭsperte. Bedaŭrinde tio estas malfacile observebla fenomeno ! Sed ankaŭ tiurilate, estus eble ne malfacile pli efiki ol la militista metodo.

Fakte la fakuloj registris pli ol 150 historiajn okazojn de pli-malpli venka neperforta rezistado. Multaj antaŭis la tamen decidigan sperton de Gandhi. Aserti, ke ne ekzistas alia defendrimedo ol la militista batalo, estas precipe montri mankon je imagopovo, aŭ nescion. Ĉiaokaze, tio estas ankaŭ senbaza "kredo".

Provizora konkludo.

La detrua potenco de la modernaj armeoj enkondukas en la historion la riskon de pli-malpli totala neniigo de la homaro, kun la inversa korolaria risko : ĉion lasi fari ne intervenante. La tragedia elekto estas de nun inter pasiva subiĝo al la invado de sia propra nacio, aŭ provoko al neniigo de ĝi, inter lasi fari

internaciajn krimojn, aŭ provoki partan aŭ totalan neniigon de la homaro. Estas probable, ke oni iros de Munkenoj al Munkenoj*, kaj la armeoj plu utilos por nenio - krom al krimaj registaroj, kies teroristaj aŭdacoj plu daŭros en senpuneco kaj en ĝenerala malkuraĝo.

"Se la homoj ne sukcesos detrui siajn armilojn, estas la armiloj, kiuj detruos la homojn", diris J.F.Kennedy**. "De nun la elekto ne estas inter perforto kaj neperforto, sed inter neperforto kaj neekzisto" (Martin Luther King).

## B. KIOM KOSTAS AL LA HOMARO LA MILITISTA SISTEMO.

### MIRIGA KREDO.

Estas evidente, ke la militoj kostas tre multe je homaj vivoj, je ĉiaj bienoj, aparte je mono. Ili ĉiufoje konsistigas timegigan ruinigadon. Sed jen : en ĉiuj tempoj, sendube sub ĉiuj ĉieloj, ili estas rigardataj kiel naturaj katastrofoj similaj al tertremoj, al inundoj aŭ al mortigaj epidemioj. Kaj la homoj kutimas rezignacii al milito kiel al tiuj plagoj.

Tamen la militon faras ja la homoj. Kaj en tiu asimilado kaj en tiu rezignacio, kiujn ni ĵus denuncis, estas io maltrankviliga kaj suspektinda. Laŭ la mezuro, en kiu milito estas fakte rezulto de iu kvanto da homaj decidoj (aŭ de manko, pro malpenemo aŭ malkuraĝo, de ĝustatempaj decidoj) estas ja la homoj, eble parte ni mem, kiuj estas respondecaj pri la militoj. Rezignacii, rigardi ilin kiel neeviteblajn, tio estas finfine demisii kiel homoj.

Kio estas neevitebla, tio estas la homaj konfliktoj. Sed ke certaj tipoj de konfliktoj, ekzemple tiuj inter nacioj, nepre devas solviĝi per milito, dum la homoj lernis solvi tiom da aliaj konfliktoj per aliaj rimedoj ol reciproka interbuĉado, jen estas kredo, kiu ŝajnas al ni suspekta, ne inda je la homo. La plimulto el la sociaj, politikaj, religiaj, ekonomiaj, konfliktoj, kiel ajn drastaj, kutime solviĝas sen interekstermado. En la aserto, ke ĉiam estis militoj, ni suspektas mirigan kredon.

---

* La internacia konferenco en Munkeno, 1938, permesis al Hitler invadi Ĉeĥoslovakion. (N.d.l.tr.)

** Parolado en la Palaco de UNO en Novjorko 1961.

Vere estas, ke por malsatigi la homojn ekzistas rimedoj ne multe pli valoraj ; sed tio nenion ŝanĝas en la problemo : ĝenerale la subpremantoj kaj la eksplùatantoj nemulte povus, se ili ne disponus armitan forton. Do, strikte dire, tio estas perforto nur dank'al la uzado de ĝi aŭ al la minaco uzi ĝin. Kaj ja la uzado de ĝi far la malsatigantoj enkondukas perforton en la subpremadon, kaj kreas, per reago, la kontraŭ-perforton de la revoluciuloj. Sed, ankaŭ ĉi tie, kial rezignacii al neevitebla fatalo ?

Luktante kontraŭ alkoholismon kaj laŭleĝan prostituadon, ni mem kutimiĝis meti al ni ĉiufoje la demandon : ĉu en tiu afero estas mono gajnebla ? Kiuj estas la financaj kaj ekonomiaj interesoj kaŝataj sub tiu propagando ? Nu, estas granda nombro da homoj, kiuj gajnas monon, multe da mono dank'al la pormilita preparado: ja tiuj havas intereson en predikado por rezignacio antaŭ neevitebla milito. Pereu la homaro, se nur iliaj dividendoj ne malpligrandiĝos ! Tamen necesus ne senkonsidere kunlaŭti. Ni do estu klarvidaj : ne estas nepra fatalo aŭ neceso en uzado de kolektiva mortiga perforto.

<u>Ŝtato kaj perforto</u>.

Oni diros al ni : la homoj estas tiel malicaj, ke estas necese, ke kelkaj tenu bastonon por trudi la aliajn rekte marŝi. Ni respondos : bedaŭrinde, la bastontenantoj estas almenaŭ tiel malicaj kiel la aliaj ; eĉ ili estas probable pli malicaj, ĉar ili devas ankaŭ lukti kontraŭ la tento trouzi sian potencon*. Kaj estas tiel facile preni ilin en manoj por farigi al ili plej aĉajn krimojn ! (Hitler, Stalin, CIA, kc).

Tradicie, kaj eĉ en teologio, oni diras al ni : en nia mondo de pekado, estas nepre necese, ke la ŝtato povu uzi la forton.

Do estas necese ĝin fidi kaj ĝin helpi, kion ajn ĝi faras, en ĝia tasko de leĝa perforto. Kaj, ĉar oni

-------

* "La forto estas tiel senkompata kontraŭ la homon, kiu ĝin posedas aŭ kredas ĝin posedi, kiel kontraŭ liajn viktimojn : se ĝi premegas la duajn, ĝi toksas la unuan." Simone Weil, L'Illiade ou le poème de la force (Iliado aŭ la poemo de la forto).

ne klare diris al ni, ke estas okazoj, en kiuj oni devas malobei la ŝtaton, nek ekde kio necesas malobei, nek kiel endas obei - oni tiel, facilanime, donas plenan permeson al la ŝtato kaj al ĝiaj armitaj reprezentantoj. Tiu rezonado ŝajnas al ni sofisma, ĉar en ĝi mankas mezmezuro. Laŭ ni, endus prefere diri : En nia mondo de pekado, la uzado de forto far la ŝtato ŝajnas nemalhavebla. Bedaŭrinde, la ŝtato ofte riskas trouzi sian forton, ĝis fariĝi mem detruanto de la socio ; do la uzado de forto far la ŝtato estas favora al la homa socio nur en certaj limoj, kiujn ĝi ne devas transi. Kiu povus kritiki tiun rezonadon ? Ĉiaokaze, ni pli proksimas la veran problemon ; sufiĉas elvoki la nomojn de kelkaj sangavidaj tiranoj por konstati, ke estas neeble malkonsenti pri nia teoremo.

Nepre necesa distingo.

Do, en la uzadoj de forto, kiuj estas teorie justaj, necesas fari distingon, se eĉ nur tial, ke ekzistas ankaŭ morala forto. Ni proponas distingi tri gradojn koncerne la intenson de la forto uzata de la publika potenco.

a) unue la morala trudo, kiam la agentoj de la publika forto ne bezonas meti la manon sur la supozatajn deliktulojn - ekzemple kiam la vojpolico devigas nin veturi laŭ devia vojo anstataŭ la vojo, kiun ni deziris iri, aŭ kiam policanoj petas nin sekvi ilin al komisariejo por identec-kontrolo.
b) estas uzo de fizika forto, kiam ili estas devigataj mastri min, se mi ne obeas ilian ordonon, kaj korpe treni min tien, kien ili volas, tamen ne flankelasante respektan sintenon kaj ĝentilajn gestojn kontraŭ mi. Vigleco kaj firmeco sendube, sed sen ia malamo, eble eĉ kun ia humurpinto, jen estas la forto : ĝi estas morale neŭtrala, kaj do, laŭ cirkonstancoj, povas esti utila kaj bona.
c) oni transas sojlon, kiam oni pasas de "forto" al "perfortego" en la momento, en kiu ĉe la agentoj de la ŝtato aperas tri novaj elementoj :
   1. senkompata superado, trudo de senkondiĉa submetiĝo al la alia, kiu estas tuj senigita je ĉia iniciateblo.
   2. parta detruo aŭ ekdetruo de la alia.
   3. malŝato al la alia.

Estas klare, ke en ĉiu perforto kiel en seksperforto, tiuj tri elementoj ĉeestas.

Tiu distingo devas helpi nin por difini la limon, ekde kiu la "forto" far la ŝtato, kia ajn estas la kulpo de tiu, al kiu ĝi estas altrudata, ĉesas labori por la paco, la justo kaj la feliĉo de la homaro, por male ankoraŭ pli gravigi la konfliktojn, la malamojn, la maljustaĵojn kaj la malfeliĉon de la homoj.

Lumiga manometro.

Ni imagu manometron en formo de duoncirklo ; la montrilo iras de 0 maldekstre al 100 dekstre. 0 estas la situacio de socio en plena anarkio, en kiu ekzistas neniu institucia aŭtoritato, kiu povus agi kontraŭ la eventualajn deliktulojn. Oni ĝenerale opinias, ke tia situacio estus katastrofa kaj neakceptebla. 100, male, estas la situacio de socio, en kiu la ŝtato uzas la fizikan forton sen ia retenemo, sen respekto al iu homa aŭ dia morala leĝo, por fari male ĉiajn krimojn (mi pensas ĉi tie pri la "ŝtatoj" de Hitler, Stalin, Amin Dada, kc.). Ankaŭ ĉi tie oni ĝenerale opinias, ke tia situacio estas katastrofa kaj neakceptebla.

Ni do necese retrovas nian teoremon : la uzado de forto far la ŝtato estas nemalhavebla por la vivo de la socio, ĝis certa limo de intenso, ekde kiu la ŝtato ĉesas agi por la bono de la homa socio, kaj komencas fariĝi ĝia detruanto. Do la tuta demando estas nun scii, kie situas tiu netranspasenda limo, tiu momento, en kiu la ŝtato ĉesas ŝirmi por komenci detrui.

Ni reprenu nian manometron, kaj ni surskribu sur ĝi la gradojn de intenso (aŭ de brutaleco) de la "forto" uzata de la ŝtato en tio, kion ĝi kredas sia devo por konservi la bonordon. Ni skribas je 10 la leĝojn (por eviti la arbitron de la juĝistoj), je 20 la tribunalojn (por kontroli la aplikadon de la leĝoj kaj certigi la defendon de la juĝatoj), je 40 la policon (senarmilan laŭ la brita modo) kaj la prizonojn (se nur iliaj gastoj estas nek humiligataj nek rompataj nek maldignigataj) ; je 50 la fizikan agadon de la ŝtatagentoj, kiam temas pri "forto", ne pri "perfortego" laŭ la ĉi-supraj difinoj. Mi pensas ĉi tie pri la uzado de ĵudo kaj aliaj teknikoj respektemaj per nudaj manoj. Ĝis tie ni havas nenion por obĵeti.

Sed, se je 60 ni surskribas la policajn brutalaĵojn en stilo de draŝado, ŝajnas al ni klare, ke ni transpasis la limon, kaj troviĝas jam en situacio, en kiu la ŝtato tiam pasis de justa forto al perfortego detruanta la juston kaj la socion entute. Je 70 ni metos la torturon, je 80 la mortopunon, je 90 la klasikan militon kun kelkaj honorreguloj, kiuj limigas la puran kaj senbremsan krimon, fine je 100 ni metos la totalan militon kaj la absolutan kriman diktaturon : la homan inferon.

La limo, kiun estas nepre necese difini, kaj trans kiu la ŝtato fariĝas detruanto de la socio, estas do 55, inter la ĵudo kaj la draŝado. Do ĉio, kion la ŝtato faras trans 55, kontribuas por detrui la socion.

Ne minimumigi la gravon de la malbono.

Oni obĵetos, ke la krimo, individua aŭ kolektiva, estas ja objektiva realaĵo, kaj ke senarmilaj policistoj aŭ soldatoj estus senpovaj kontraŭ la banditismo. Eble... sed necesus ankaŭ esplori la demandon : kiu fabrikas la banditismon ? Kiu estas la proporcio de la armiloj troviĝantaj en la manoj de banditoj, post kiam ili estis ŝtelitaj de la polico aŭ la armeo ? Kiu pelas la teknikan pliperfektigadon de tiuj armiloj ? Kiu donis ekzemplon pri murdado ? Kaj kiu instruis tiujn banditojn, kiam ili estis 20-jaraj, murdi kun efikeco kaj bona konscienco ? Ĉu en kino aŭ televido la murda ago estas ĉiam prezentata kiel abomeninda kaj nepravigebla krimo ? Ĉu la glorado de la milito kaj de la armeoj vere neniel efikus por la krimeco ? Ĉu ni estas tute certaj pri tio ? Ĉu ne endas kalkuli kun ĉiuj elementoj de la problemo ?

Restas, ke la obĵeto estas serioza kaj meritas nian atenton. Estas vere, ke nia manometro kalkulas nur pri parto de la realo. Ĝi koncernas nur la sintenadon de la fortoj nomitaj "de la ordo" (kiuj ofte servas por teni en situacio establitan malordon aŭ ĝeneraligitan maljuston) - kaj ĝi ne kalkulas pri la realaj, eble teruraj krimoj, kiujn riskas fari iuj individuoj. Sed ĝuste oni devas atenti kune la du aspektojn de la realo, kiu, ankaŭ ĉi tie, estas dialektika.

La kazo de Mesrin.

Ni konsideru konkretan ekzemplon. Kiam li estis en Alĝerio, Mesrin partoprenis en 17 "aferoj", komprenu :

ordonitaj masakroj. Hejmen reveninte li komprenis, ke oni trompis lin, ke la justo staris flanke de tiuj, kiujn buĉi oni komandis al li. Li sin turnis sovaĝe kontraŭ "la socion" kaj sin venĝis fariĝante sovaĝa kontraŭulo de la bonpensa ordo, li kulpis abomenindajn krimojn, kaj fine li estis murdita de la pariza polico, laŭ skemo tre simila - ni tion prefere notu - al la murdoj kulpitaj de la "ruĝaj armeoj". Oni scias, ke kiam ili ludas "ĝendarmoj kaj ŝtelistoj" en la lerneja korto, ankaŭ niaj knabetoj, ĉe unu aŭ alia flanko, faras alterne proksimume la samon.

Sur nia manometro, kion faris Mesrin, tiel kiam li estis soldato, kiel poste, tio situas tute dekstre, ni diru je 90 ; li simple ŝanĝis je flanko, je bordo. Aliaflanke, la policanoj, kiuj murdis lin, faris duvizaĝan agon : unuflanke, konsiderante tion, kion Mesrin faris kaj riskis ankoraŭ fari, la policanoj, koncerne la celon, "bone" agis metante lin ekster eblon malbonon fari. Sed aliflanke, laŭ la perspektivo de la uzataj rimedoj kaj de ilia influo al la socio, ili kulpis detruan agon al tiu socio : ili punis lin antaŭ ol li regule estus prezentita al leĝa tribunalo, kaj tion ili faris kun perfekta mallojalo. Do ilia ago estis ambigua, kaj sin prezentas la demando : ĉu la policanoj, terure murdante Mesrinon, pli ŝirmis la socion, aŭ pli vundis ĝin ? Aŭ ĉu la vundo ne estis multe pli grava ol la ŝirmo ? Ĉu estis vere neeble agi ĝuste, konforme al la civilizaj leĝoj ?

Al ni ŝajnas ke, se oni konsideras la tuton de la Mesrin-kazo, oni konstatas, ke la malbona aspekto de la perforto de la ŝtato estas multe pli grava ol ĝia bona aspekto. Ni opinias ke, se oni volas, poste, ĝuste konsideri la tuton de la fenomeno ŝtata perforto (ni ja diras : perforto), oni povas nur atingi la saman konkludon : la perforto de la ŝtato estas pli malbonfara ol utila por la homaro.

Niaj legantoj facile komprenos, ke la sama demando sin trudas pri la milito, eĉ "defenda". Ĉiu armeo batalanta por justa afero eble helpas iom ŝirmi la homan socion ; sed samtempe ĝi ankaŭ kaj certe detruas ĝin per la abomenaj kaj demoralizaj rimedoj, kiujn ĝi uzas. La demando estas : ĉu, vidalvide al la rimedoj, kiujn

ĝi nun disponas, la armeo ne pli detruas ol ŝirmas : denove la pavimero de la urso. Ĉiaokaze, la milito estas ĉiam, sed pli kaj pli, laŭ la esprimo de Denis de Rougement, "la ŝtatigita krimeco"*.

Iom da filozofio.

Laŭ iuj aŭtoroj (Weber, sekvita de Ricoeur) ĉiu ŝtato stariĝas kaj sin tenadas dank'al perforto, tiel ke tiu ĉi estas al ĝi fundamente nemalhavebla ; kaj estus ja naive ambicii, ke ĝi rezignu pri ĝia uzado. Kaj tial multaj, eĉ inter kristanoj, pravigas la armeon kaj la militon. Ĉi tiuj, samkiel la polica premado, estas esence necesaj al ĉiu socio starigita kiel organizita ŝtato.

Sed ankoraŭfoje la realo estas dialektika, kaj oni povas tiel bone subteni ankaŭ la tezon inversan, nome : la ŝtato sin starigas kaj tenas ne dank'al, sed malgraŭ la perforto, kiun ĝi uzas. Ĉar tiu ĉi estas ĉiam detrua al la homa socio ; kaj, uzante perforton, la ŝtato fosas sian propran tombon kune kun tiu de la nacio (Aleksandro la Granda, Napoleono, Hitler, Diem, Batista, Amin Dada, Bokassa, kc). Ambaŭ tezoj estas defendeblaj, sed kial ĉiam forĵongli la duan ?

Estus vere simpleme kredi, ke la ŝtata perforto produktus nur kontraŭtoksaĵojn bonefikajn por la homa socio; ĝi ankaŭ, kaj eble precipe, produktas drastajn toksaĵojn, kiuj venenas la socion, multigas la kolerojn, la timojn kaj la malamojn, kaj detruas aparte la civitan spiriton, kiu tamen estas la cemento de tiu socio. Ĉiufoje kiam la ŝtato (aŭ la perfortaj revoluciuloj) mortigas homon, ili kreas al si 50, 500 aŭ 5000 malamikojn pli-malpli nepardonemajn. La murdintoj de Allende eble kreis tra la mondo 5 milionojn da malamikoj al la usona "liberalismo". Ĉu ne estas okulfrape, ke la uzado de perforto estas kiel multe da medikamentoj : ili estas bonefikaj en malgranda kvanto, sed danĝeraj kaj detruantaj, kiam oni transas la preskribitan dozon. Kaj, ni tion vidis, tiu transpaso tre rapide okazas.

Nun ni enpaŝu en detalojn.

La moralaj toksaĵoj de la militista servo.

---

* Denis de Rougemont - L'avenir est notre affaire (La estonto estas nia afero) p.318, eld. Stock, Parizo.

La armeo havas kiel esencan taskon instrui kaj organizi la murdadon de tiuj, kiujn necesas mortigi. Nu tiuj ĉi estas en grandega plimulto senkulpaj. Civilaj aŭ militistaj, malamikaj aŭ samlandaj, la plimultaj estas, kiel la soldatoj, kiuj ilin murdas, malfeliĉaj homoj, kompatindaj viktimoj superataj de la okazoj, kaj ilia nura malpravo estas finfine, ke ili ekzistas tie, kie ili estas. Tiu maljusto, tiu frenezaĵo povas nur profunde demoralizi kaj tiujn, kiuj estas iliaj viktimoj, kaj precipe tiujn, kiujn oni trudas esti iliaj buĉistoj.

La militistaj ideologio kaj sistemo estas bazitaj sur la potenc-instinkto, la malsaneca kaj kontraŭevangelia kontenteco komandi, disponi potencon super aliaj, eĉ en iuj momentoj la sadisma ĝuado teni alian sub sia arbitra volo, ĉu li estas malamiko, suspektulo aŭ simple subulo. Havigante al la soldato gloran pravigon de tiu instinkto, kaj donante al li la eblon sin senbridigi al aliaj de la humiligoj, kiujn oni sisteme trudis al li, la militista organizo facile transformas lin en ekzekutiston, en torturiston, en murdiston aŭ en pograndan ekstermiston ; kaj des pli facile, ke pli kaj pli ofte li ne vidas, kiun li murdas. Tiel, dank'al la tekniko, la sistemo atingas realan malhomecigon de multaj el niaj "herooj" kaj, tra ili, de larĝaj tavoloj el la homaro, de ĉiuj, kiuj admiras tiujn "heroojn" kaj kliniĝas antaŭ la Forto por ĝin adori kaj subiĝi al ĝia leĝo.

La militista sistemo kontribuas al glorado de la "vireco" komprenata kiel brutaleco, kaj al akceptigo de la ĝangala leĝo de tiu ĉi mondo. En tiu senco ĝi estas ne nur la lernejo de disciplino kaj kuraĝo, sed ĝi estas ankaŭ la lernejo de kontraŭcivilizo. Ĝi ja postulas de tiuj, kiuj estas al ĝi submetitaj, sintenadon kaj vivkoncepton en radikala kontraŭeco al ĉio, kio estas nomata civilizeco. Tio sin manifestas ekde la sintenado de la konskriptoj en la tago de la revizo (en tiu tago forfalas la plej elementaj tabuoj, kio estas signifoplena) tra la sinteno de kolonelo Tejero en la Madridaj "Cortes" en februaro 1981 (en absoluta malkuraĝo, humiligi la popolreprezentantojn), ĝis la nuklea ekstermado de la "demografiaj celoj".

La modernaj armeoj suferas de denaska nekuracebla malsano : ili posedas teruran detrupovon, dum la du fundamentaj principoj, sur kiuj ili estas bazitaj - stulta hierarkia obeado kaj la celo praviganta la rimedojn - nemulte favoras la floradon de kritika spirito kaj de morala sento ĉe ilia personaro. De tio fontas la nekredebla obeemo de la militistoj por efektivigi tiom da krimoj (Guernica, Dachau, Oradour, Sétif, ktp), tial ke la militista sistemo anestezas ilian individuan konsciencon kaj detruas la senton pri persona respondeco.

Eĉ plie : preskaŭ ĉio, kion faras armeo en operaco, kontraŭas kaj detruas tion, kion dum jarcentoj saĝuloj provadis akceptigi, por ke la civilizacio eliĝu el barbareco. Tial ke la leĝo de la plej forta, idealigata kaj sanktigata per la militista sistemo, estas fundamente krimokaŭza. Por multaj homoj ja, kion faras la ŝtato, tio estas morale normiga. Ĉar ilia armeo povas masakri virinojn, infanojn kaj maljunulojn sen perdi sian aŭreolon el gloro, ne estas motivo, pensas iuj, sin ĝeni por samon fari. Kaj la atomarmilo estas modelo tiel sugestiva kaj ĉarma por la ostaĝokaptoj...

Do la militista sistemo estas unu el la plej bonaj predikantoj de la mortiga perforto. Ĝi blokas ĉiujn moralajn progresojn de la homaro, dum la grandegaj progresoj de la scienco disponigas al la homoj rimedojn ĉiam pli diablecajn por detrui la popolojn kaj iliajn civilizaciojn. Estas tiu malkongruo inter la tekniko kaj la moralo, inter la militista mondo kaj la civilizacio, kiu klarigas la konfuzecon kaj la malesperon de tiom el niaj samtempuloj - sen forgesi la plimultiĝon de la sinmortigoj.

Sed la leĝo de la plej forta sanktigata de la sistemo estas ankaŭ infaneciga. Kiam afero misas, la infano frapas aŭ ĉion rompas : ĝi estas senrespondeca. Kaj tiel kondutas tre ofte la armeoj. Dum la Alĝeria milito, unu el miaj paroĥanoj, mekanikisto, ĉiutage alkroĉis sub la flugiloj de aeroplanoj el sia aviadbazo napalmbombojn ; li sciis, ke ili estas destinitaj por vive bruligi en terura kaj longa agonio, la loĝantojn de vilaĝoj, kiujn oni simple suspektis, ke ili eble gastigis dum la nokto patrolojn el la FLN (Fronto de Alĝeria nacia liberigo).

Tio ne estis la maniero plej inteligenta por restarigi reciprokan konfidon kaj amikecon inter Alĝerianoj kaj Francoj.

Alia parohano rakontis al mi jenon. Ĉe la enirejo en Alĝeria vilaĝo vigla debato grupigis plurajn francajn soldatojn : temis scii ĉu, kiam homo estas mortigata, li spontane urinas. Tiam pasis alĝeria maljunulo kun lignofasko sur la dorso. Komplica ekrigardo - kaj unu el la soldatoj, kiam la maljunulo preterpasis, lin pafmortigis per sia fusilo. La junaj soldatoj eksaltis al la viktimo por vidi, ĉu li malsekiĝis*.

Tiel konsternajn ekzemplojn oni povus multigi. La teruriga efikoj de la tekniko nepre postulas la transpason al plenkreska aĝo, kiu signifos la adopton de neperfortaj metodoj por rezisti al maljusto.

Ne eblas fini pri tiu punkto sen jena neta aserto : la nura fakto, ke la ŝtato akceptas la principon de uzado de nukleaj armiloj, kiuj estas perfekte malmoralaj, konsistigas unu el la ĉefaj kaŭzoj de la demoralizado (en ambaŭ sencoj de la vorto) konstatebla en la sino de niaj popoloj.

## La socipolitikaj toksaĵoj.

Oni povas malfacile forpeli la suspekton ke, se la armeo estas senefika por defendi la landon, kiel en 1870, ĝi estas tre efika por premegi, kiel en 1871, la malgrandan popolon, kiam ĝi provas ribeli kontraŭ siajn regantojn. Cetere ĝi sin preparas jam multajn jarojn por tio. Ĝi do ŝirmas ne tiom la patrion, kiom certajn privilegiojn kaj certajn favoratajn kastojn, oriente

-------

* "La armiloj movas en la fundo de la koroj la ŝlimon de la plej aĉaj instinktoj. Ili proklamas la murdon, nutras la malamon, elkatenigas la avidon. Ili estas premegintaj la malfortajn, ekzaltintaj la malindajn, subtenintaj la tiranecon. Senhalte ili detruas la ordon, disbatas la esperon, mortigas la profetojn... La armiloj torturas, sed ankaŭ formas la mondon. Ili efektivigas la plejbonon kiel la plejmalbonon, naskas la malnoblon same kiel la plejgrandon, ili laŭvice rampas en la hororo aŭ radias en la gloro". Ch.de Gaulle - "Le fil de l'épée" (La tranĉrando de la spado), eld. Berger-Levrault, Parizo. (Jes, sed kian gloron ?) (Noto de la aŭtoro).

kiel okcidente. "Neniam ĝi servis por defendi la popolon, sed ja plivere por ĝin sklavigi", diris al ni generalo de Bollardière*.

Cetere, ĉu la militservo ne celas ankaŭ, per sia dresado, konvinki la amason de la konskriptoj, ke ili devas sendiskute obeadi al la kasto de la oficiroj, kiu decidas pri ĉio por ili, kaj tiel prepari ilin, por ke poste ili obeadu la postulojn de la kasto de la aferistoj (aŭ de tiu de la "Nomenklatura"), kiel sklavoj subigitaj kaj rezignaciantaj ?

Aliaflanke, per la sola fakto de sia potenco, la militista sistemo pezigas sur la politika ordo konstantan premadon, kiu evoluas inter kontrolo kaj minaco. Kun sia ĉiama aliancano, la premgrupo de la kanonvendistoj, ili ambaŭ konsistigas senkomparan premforton, kiu inklinas falsi la normalan funkciadon de la demokratio. Vidu la nekredeblajn garantiaĵojn, kiujn la francaj komunista kaj socialista partioj, kiam ili vidis proksimiĝi la tagon de sia venko, sin kredis devigitaj konsenti al ili, kun konfuziga servopreteco !

Tiel la armeo riskas aŭ dispremegi ĉiun revolucian movadon, kiel ajn justan, aŭ konservi sur ĝia loko ĉiun maljustan reĝimon, kiel ajn malamindan, aŭ ankaŭ starti puĉon por mem ekkapti la politikan povon kaj instali diktaturan reĝimon, necese malleĝan kaj malhumanan, kaj tio en Oriento kiel en Okcidento. Ĉar ĝi mem estas demokratia nek en sia organizo nek en sia mensostato, ĝi tre malofte sin montras kapabla protekti aŭ restarigi la demokratiajn instituciojn. Tre ofte ĝi servas por ilin detrui. Pensu pri Hispanio kaj Latinameriko !

<u>La internaciaj toksaĵoj</u>.

Kaptite de la nea karaktero de sia unuavica celo (teren faligi la kontraŭulon per ĉiaj rimedoj), aliflanke tentate per la orgojlo de la forto, la militista ideologio ĝenerale kondukas al privilegiigo de la mallonga tempolimo kontraŭ la longa, kio ofte sekvigas ruinigajn konsekvencojn : okupado de la Rur-regiono, Stalingrado, Sétif, Hajfong, Madagaskaro 1947, ekziligo de la Maroka

------

* En sesio pri Teologio kaj Neperforto. Le Chambon-sur-Lignon, septembro 1981.

sultano, ktp. La malkoheraĵoj, la vundoj, la amaraĵoj de tio rezultantaj estas sennombraj.

Ja vere, la staboj, aŭ tiuj, kiuj uzas iliajn servojn, ĝenerale pravigas sian brutalan manieron solvi la internaciajn konfliktojn, elvokante la nekapablon de la internaciaj politikaj instancoj por solvi tiujn konfliktojn. Sed tiuj instancoj estis konstante superitaj, paralizitaj, tenitaj en fiaskostato per la premado de tiuj, kiuj estas konvinkitaj, ke nur la "forto" povas valide solvi tiujn konfliktojn. En tio kuŝas alia magia cirklo, el kiu la militista sistemo estas totale nekapabla eligi nin : ĝi ja enfermas nin en ĝi.

Por ekzemploj, Izraelio, Sudafriko kaj Francio estis en la lastaj jardekoj plurfoje kondamnitaj pro siaj brutalaj agoj kontraŭ respektive Palestinanoj, Nigruloj kaj Alĝerianoj ; estis ordone postulite, ke ili ŝanĝu sian politikon kontraŭ ili. Sed tiuj tri regnoj nur fajfis pri tiuj kondamnoj kaj tiuj postulordonoj, ĉar ili disponis potencan armeon, kaj tio ebligis al ili spiti la tutan mondon kaj piedpremi la klopodojn entreprenitajn por starigi internacian ordon.

Do nia malfeliĉa mondo estas kaptita de nesolvebla dilemo : aŭ milite interveni, je risko provoki ĝeneralan kaj fatalan konfliktegon, aŭ resti senpova antaŭ la krimoj kontraŭ la homaro. Eble la alvoko al neperfortaj metodoj ebligus eskapi el tiu magia cirklo.

<u>Ĉu rimedo, aŭ pigreca kapkuseno</u> ?

Oni objetos al ni, ke bedaŭrinde ekzistas ribelantaj minoritatoj, kiuj ne hezitas uzi perforton, eĉ teroristajn atencojn kaj krimojn - kaj ke la militista institucio estas necesa por certigi la tenadon de la ordo, la revenon al trankvilo kaj la regadon de leĝeco. Ni agnoskas, ke en tio estas reala problemo. Sed ĝuste, ĉu la interveno de la armeo estas la adekvata rimedo ?

La Bretonoj ne vendas siajn artiŝokojn, ili blokas la prefektejon ? Oni sendas al ili la CRS*. La sudfranciaj vinkulturistoj ne vendas plu sian vinon, ili baras

------

* Compagnies républicaines de sécurité (ĝendarmaro kun speciala tasko ŝirmi la publikan ordon) (N.d.l.tr.)

la aŭto- kaj fervojojn ? Oni sendas la trupon, kiu eble pafos en la amason. La Germanoj ne pagas plu siajn militajn monpunojn ? La armeo invadas la Rur-teritorion. La Alĝerianoj ribelas en 1946 ? La armeo masakras da ili pli ol 10 000 ; rezulto : nova ribelo en 1954 ; oni sendas 500 000 soldatojn por ilin perforte obeigi. Oni scias la finan rezulton. La Hungaroj ribelas en 1956, la Ĉekoj en 1968 ? La ruĝa armeo dresas ilin sen ion ŝanĝi. La katolikaj irlandanoj ribelas ? Oni sendas al ili la armeon - oni scias la rezulton. Kaj oni povus multobligi la ekzemplojn, ĉiujn pli-malpli afliktajn.

Ĉu la eraro ne konsistus el tio : kredi, ke oni povas gajni tempon sendante la "fortojn de la ordo" tien, kie profunda malkontento, ne serioze priatentita, finiĝas per senkaŝa ribelo aŭ per la konsterna metodo de atencoj? La nura ĉeesto de la trupo pli kolerigas la manifestaciantojn, kiuj sin sentas ne komprenataj kaj provokataj. Ni kredas, ke la granda eraro flanke de la aŭtoritatoj konsistas el tio : fidi la alvokon al la armita forto, prefere ol tuj ekkontakti kun la malkontentaj, ilin aŭskulti, evalui la justecon de iliaj plendoj, kaj serĉi kun ili, en aperta dialogo, pacience kaj lojale, se eble publike (kaj en TV, kial ne ?), kiel rimedi al la maljustaĵoj, kiuj estas ĉe la deirpunkto de la kontesta movado.

Neniam, niaopinie, oni devas lasi putri situacion de maljusto : en tio kuŝas la fundamenta kulpo, la foresto de la armeo helpas eviti ĝin, ĉar male la armeo preskaŭ aŭtomate trudas la kontestantojn ekuzi atencojn. Ili ne vidas alian eliron, kaj ili kredas, ke ili devas alfronti sian kontraŭulon sur ĝia propra tereno, tiu de perforto (Vaskio, Irlando).

## Decida elekto.

La militistaj institucioj kostas tiel grandegajn kaj skandalajn monsumojn, ke restas nenio plu por nutri la malsatantojn en la Tria Mondo nek por humanigi nian prizonan sistemon kaj pli efike lukti kontraŭ la krimecon kaj ĝiajn diversajn kaŭzojn. Kaj tamen tiuj diversaj buĝetoj, se ili estus provizitaj je kosto de tiu de la nacidefendo, ebligus starigi veran socian juston ; kaj tiu ĉi konsistigus la plej efikan ŝirmadon de la homa socio, la plej bonan kontraŭvenenon al milito kaj al delikteco.

La granda historiisto Arnold Toynbee montris*, ke almenaŭ dek unu pasintaj civilizacioj tute malaperis el la surfaco de la tero ; ili estis forigitaj kaj neniigitaj ne de naturaj katastrofoj aŭ epidemioj, sed ja pro la milito. Tiu ĉi povus ja, iun baldaŭan tagon, neniigi la civilizacion mem, kaj eble la homan specion. Ni estas el tiuj, kiuj ne rezignacias pri tio.

## KONKLUDO.

Restas al ni provi klarigi, kiel ideologio kaj sistemo tiel absurdaj, tiel barbaraj, tiel ruinigaj, povas esti, ankoraŭ nun, en tia grado florantaj. Ili venke rezistis al jarmiloj da humanista civilizacio kaj al dumil jaroj da kristanismo, kvankam ili senkaŝe kontraŭdiras unu kaj la alian. Plie, ili akiris ekzistorajton tiel en la mondo kiel en la sino de la eklezioj, sen ion malkonfesi el siaj kontraŭevangeliaj postuloj kaj el sia malbonfarado. Jes, kiel klarigi, ke en la XXa jarcento la preskaŭ tuta homaro restas submetita al ideologio kaj sistemo, kiuj havigis al la homoj tiom da suferoj, da mortoj kaj da ruinoj, kaj kiuj nun pezigas sur ilin tiom da minacoj ?

Ni ĉi tie proponas klarigon : la militista ideologio kaj la de ĝi naskita sistemo estas fakte religio, tre antikva pagana religio. Ni nomas paganismo la gloradon kaj diigadon de instinkto de la homa naturo, kies satigo havigas al la homo ekstazon kaj sinsuperemon. Ni kredas, ke la militistaj ideologio kaj sistemo konsistigas karakterizitan paganismon, kiu estas malakordebla tiel kun la raciismo kiel kun la evangelio de la Nova Testamento.

Ja, de post la plej malproksima antikveco, la milito estas sankta, religia entrepreno, kiu havas siajn templojn, siajn altarojn, siajn pastrojn, sian sanktan muzikon, siajn tabuojn, siajn festojn kaj siajn kolektivajn ekstazojn, sian kulton al mortintoj, kaj precipe sian fatalistan rezignacion, kiu estas tiel karakteriza de ĉiuj paganismoj. Por ekzemplo : ĉar iam iu urinis sur la flamon de la nekonata soldato sub la Pariza triumfarko, necesis solena "elaĉeta" ceremonio por for-

* Arnold Toynbee - Milito kaj Civilizacio, eld. Gallimard, Parizo.

viŝi la "sakrilegion" kaj redoni al la flamo ĝian "sanktan" karakteron. La sinteno de la partoprenantoj en ĉiu patriota kaj militista ceremonio estas cetere tipe religia sinteno. Kaj inter la legantoj, kiuj ĝisfine sekvis nin, kiom neniam eksaltis, opiniante, ke niaj vortoj estas vere tro sakrilegiaj kaj blasfemaj ?

Ni konsideru alian ekzemplon. Ĉu la punado kontraŭ la konscienc-obĵetantoj ne estas tipa formo de religia persekutado ? Ekzakte kiel, iam, la Inkvizicio persekutadis tiujn, kiuj ne vizitis la meson, tial ke ili ne kredis plu pri ĝi, la anoj de la armeo severe persekutas tiujn, kiuj rifuzas la "servon", tial ke ili ne kredas plu pri ĝi. En ambaŭ okazoj la ne-konformistoj estas rigardataj kiel danĝeraj por la socio. En ambaŭ okazoj oni postulas, ke ili almenaŭ ŝajnigu kredon, por ne riski ŝanceli la kredon de la plimulto.

Se ne temas pri neracia "kredo", kial la anoj de la militista servo tiel sisteme fuĝas dialogon kun tiuj, kiuj ne kredas pri ĝi ? Kio estas sankta, tio estas tabua. Precipe se oni ne povas demonstri ĝian bonefikon.

<u>Alvoko</u>.

Ni supre menciis la facilecon, kun kiu la soldatoj sin lasas manipuli por fari kion ajn. La historio de la tuta mondo eĥas en ĉiu paĝo, en monotona ĝemado, la funebran kaj teruran vorton : "Jen estas tio, kion faris la soldatoj" (Johano 19-24). Raĥel ne ĉesas priplori siajn infanojn masakritajn de la soldatoj (Mateo 2-18). Kaj se la homoj ne konvertiĝos al neperforto, se la tero estos tute vitrigita per ilia faro, Dio mem plantos en la malvarmiĝintajn cindrojn doloran epitafon : "Jen estas tio, kion faris la soldatoj."

Fratoj, vekiĝu ! Estas iluzie kredi, ke la homaj problemoj estas solveblaj per aliaj rimedoj, ol tiuj de amo.

Jean Lasserre.

En la sama serio de SAT-Broŝurservo :

Civila malobeemo (H.D.Thoreau)
Neperforta revolucio (T.Ebert)
Politika neperforto (M.A.N.)
Por la paco, kontraŭ la milito (citaĵoj)
Unuflanka malarmiĝo de Francio
kaj cento da aliaj tekstoj...

Directeur de publication
& imprimeur : Chr. Baudé
F 47340 Laroque Timbaut.